



8-6-1974

CGC Nº

00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 — AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 — Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 — 1182

Telefone 42-9090

70.000 — Brasília (DF)

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA — DISTRITO FEDERAL

Nº 19

SETEMBRO DE 1976

BOLETIM INFORMATIVO

Redação: MARIA ALMADA

NI KUNLABORU KUN LA INTERNA- CIAJ FAK-ASOCIOJ

La esperantistaj fak-asocioj celas prezenti en diversajn mediojn la lingvan solvon de Esperanto per kunordigita tutmonda agado. Estas do tasko de ĉiu samfaka esperantisto kunlabori en tiu grava agado. Lastatempe alvenis tri alvokoj, kiujn ni metas je la atento de niaj gelegantoj:

— Internacia Poŝtista Kaj Telekomunikista Esperanto — Asocio (IPTEA)

En februaro 1976, la Asocio sendis al 240 poŝt-administracioj, membroj de Universala Poŝta Unio, informan leteron proponante Esperanton kiel oficialan labor-lingvon de la Unio mem. Tiu estis nur la unua paŝo de Kunordigita agado, kiu devos konvinki almenaŭ unu poŝt-administracion prezenti oficialan proponon en tiu senco, dum la venonta monda kongreso de la Universala Poŝta Unio, kiu okazos en **Brazilo** dum la jaro 1979—a! Jen do la grava respondeco de ĉiuj brazilaj esperantistoj: krei la premisojn por ke tiu propono estu akceptita kaj servu kiel signifoplena antaŭpreparo por nia Universala Esperanto-Kongreso dum la jaro 1980—a. Pro tio ni alvokas niajn gesamideanojn, kiuj profesie laboras en la poŝtistaj kaj telekomunistaj instancoj aŭ kiuj konas funk-

ciulojn en tiu medio, por ke ili kontaktu plej baldaŭ nian Konsilantaron cele al starigo de taŭga laborplano.

Brazilo jam havas tradicion en la uzado de la Internacia Lingvo en la poŝto kaj sekve ne estos malfacile atingi konkretajn rezultojn, kondiĉe kompreneble, ke ni ĉiuj kunlaboru.

Internacia Esperanto-Klubo

Aŭtomobilista (IEKA)

Celo de la klubo estas aplikadi Esperanton kiel solvon de la lingvo-problemo en aŭtomobilistaj medioj. Tiu problemo sentiĝas precipe en Eŭropo, kie aŭtomobilisto devas ŝanĝi pli ofte lingvon ol oleon, dum iom longaj vojaĝoj! Pro tio, ĝis nun, la klubo havas pli ol mil membrojn ĉefe en Eŭropo kie ĝi jam kontaktis plurajn naciajn aŭto-klubojn prezentante al ili la avantoĝojn de Esperanto kaj instigante ilin eldoni frazarojn en la Internacia Lingvo. Sed ankaŭ en Brazilo, kie aŭtomobilismo estas tre populara, estas eble efike labori en tiu medio, kondiĉe ke ni povu prezenti atendindan nombron de esperantistaj aŭtomobilistoj.

La aliĝo al Klubo estas tre simpla kaj sen formalajoj.

Dumviva kotizo sumas nuntempe je nur 30 kruzejoj kaj oni ricevos glu-insignon por apliki sur la antaŭ-glacon de la

aŭtomobilo. Reprezentanto de la klubo por Brazilo estas S-ro Giuseppe Grattapaglia — Caixa Postal Nº 04-0097 — 70.000 — Brasília (DF), al kiu oni povos sendi la kotizon, prefere per ĉeko pagebla en Brazilio.

★★★★★★

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

De tempo al tempo, brazilaj parlamentanoj, amikoj de Esperanto, prezentas leĝprojektojn por la enkonduko de la instruado de la Internacia Lingvo. Sed ĉiu parlamenta iniciato, sen apogo de la bazo, ne povas sukcesi. Tiu "bazo" devus esti forta asocio de Esperanto-instruistoj, kiu internaci-skale jam bone laboras en tiu kampo. En Brazilo ne ekzistas ĝis nun sekcio de ILEI, kvankam multaj geinstruistoj sindediĉas kun sukceso al la instruado de nia lingvo. Ni alvokas ĉiujn geinstruistojn, kiuj deziras labori en tiu fako, por ke ili sin anoncu ĉe nia Konsilantaro kun la celo starigi sektion de ILEI en Brazilo.

★★★★★★

NI SCIIGAS...

GOJANIO (GO) — Ni ricevis la Informan Bultenon "LA AGLO", kiu sciigas nin pri la bona agado en tiu progresiga urbo. Gratulon al niaj klopodemaj gesamideanoj, kiuj fortostreĉas por porti la torĉon de nia idealo. La informilo estas altnivela. Ĝi alportas belegajn versojn de la fama poeto hungara Petofi, kiun plezure ni citas:

"Ho, la viv' nur estas spiro sur spegulo, ombro de l' kuranta nubo sur rivero".

GAZETOJ RICEVITAJ:

O Estado do Paraná; O lider, el Barra Mansa; A Tarde, el Salvador (BA); A Tribuna, de Indaiá, el Indaiatuba (SP); La Aglo, el Gojania (GO); o Correio Fraterno do ABC; A Tribuna de Taubaté; Jornal Espírita; a Folha Espírita; o Matutino Popular; a Tribuna, el Santos.

Ni kore dankas al ĉiuj.

★★★★★★

SANTOS (SP) — La urbestro de Santos (SP), D-ro Antonio Manoel de Carvalho invitita patrono de la XII Brazila Seminario de Esperanto, organizata de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Centro Esperantista de Santos, konsentis kaj responde akceptis. La Seminario okazos en la venonta jaro 1977—a, de la 14—a ĝis la 17—a de julio.

La urbestro klopodas helpi la movadon ĉar li jam lernis Esperanton en kurso gvidita de Prof-ro F. S. Almada. La gazeto "A Tribuna" de nia urbo, unu el la plej gravaj informiloj de la "Ŝtato São Paulo" kiu ofte publikigas artikoloj de nia prezidanto, diskonigos akurate la necesajn informojn pri la Seminario.

Ni esperas kaj petas apogon de ĉiuj niaj gesamideanoj por la XII Seminario.

★★★★★★

SÃO PAULO (SP) — Niaj gevicprezidantoj F-ino Elvira Fontes kaj Benedicto Silva verkis imponan artikolon por la "Jornal Espírita" pri Esperanto kaj la movada agado en Brazilo.

Ni gratulas niajn karajn gesamideanojn, kiuj ne mezuras forton por venkigi

la Internacian Lingvon.

Ke ilia agado estu ekzemplo por niaj gekunlaborantoj tra la tuta Brazilo.

★★★★★★

INDAIATUBA (SP) — Senlace laboras nia vicprezidanto Prof-ro Wanderley Peres en tiu ĉarma urbo. Li estas kunlaboranto de "A Tribuna de Indaiá", loka kaj elstara gazeto, kiu ofte aperigas artikolojn pri Esperanto. Ni lin gratulas.

★★★★★★

CAÇAPAVA (SP) — Alia senlaca kunlaboranto estas nia vic-prezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho, kiu vaste disvastigas Esperanton en Caçapava kaj aliaj urboj najbaraj.

S-ano Silva Velho estas forta kolo de nia BKE. Liaj artikoloj estas laŭdinda laboro por nia movado.

★★★★★★

SANTO ANDRÉ (SP) — Nia vicprezidanto s-ano José Dias Pinto festis la 25-an datrevenon de lia laboro en la Kompanio "Pollone". La direktoro de tiu grava industrio ofertis al sia elstara kunlaboranto grandiozan bankedon, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj, inter kiuj troviĝis F-ino Elvira Fontes, nia vicprezidantino kaj prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, nia vicprezidanto Prof-ro Lazslo Zinner kaj Familio, nia prezidanto Prof-ro F.S. Almada kaj lia edzino Maria Almada, kiu deklamis poemon dediĉitan al omaĝinto.

S-ano Dias Pinto eluzis la okazon kaj en Esperanto dankis al gesamideanoj pro ilia ĉesto dum la cerimonio.

La festenon fermis programo de kantoj kaj dancadoj laŭ la portugala folkloro.

SÃO MIGUEL PAULISTA (SP) — En la 19-a de septembro pasinta estis organizita en la Klubo Zamenhof tekunveno. Laŭ la informo de s-ano Silva Velho, kiu ĝin partoprenis, ĉeestis pli ol 100 personoj, inter kiuj niaj vicprezidantoj W. Francini, li kaj D-ro Holanda.

Informis ankoraŭ nia vicprezidanto Silva Velho pri la elektode nova estraro de la Esperanto-Klubo Zamenhof:

Prezidanto: — Herito da Silva Almeida; Vicprezidanto: D-ro Oswaldo Pires de Holanda; Ĝenerala Sekretario: Maria Vitória da Silva; 1-a Sekretario: — Nivaldo da Silva Chaves; 2-a Sekretario: Osmarina Ribeiro de Souza; 1-a Kasisto: — Maria de Lourdes Correia; 2-a Kasisto: — Antonio Radica; Direktoro pri Propagando: — Hebiton Joaquim P. Gonçalves; Bibliotekisto: — — Euclides Cândido Pereira. Sócio Fundador Benemérito: — Deputado Estadual Osiris Siveira.

Bonan laboron ni esperas de la estraranoj. Gratulon!

★★★★★★

BRAZILIO (FD) — Nia s-ino Leila Maria Soares, prezidantino de la Esperanto-Grupo Iŝmael inforis: "Plezure ni komunikas la fondon de la Esperanto-Grupo Iŝmael, ĉe Brazila Spiritisma Federacio Sekcio Brazilio (FD). Laŭ ĝia statuto la ĵusfondita grupo celas disvastigi nian karan lingvon interligite kun la Spiritisma Doktrino kaj interŝnĝadi, librojn, korespondaĵojn, PK-ojn, ktp. inter la landaj kaj la eksterlandaj esp-institucioj kaj la esperantistaro ĝenerale".

Vizitante Brazilion, bonvolu kontakti tiun grupon, kies adreso estas: Av. L-2 Norte-Quadra 603 Mod. F / G — 70.000.

S.JOÃO DA BOA VISTA (SP) – Nia laborema vicprezidanto D-ro Jatir Gonçalves Vieira informas nin, ke laŭ la Rezolucio 13/75 de la komunuma Ĉambro de São João da Boa Vista, en la 30-XII-75 estis starigita "Trofeo Kulturo kaj Evoluo" je la valoro de Cr\$ 1.000,00 jare por premii la konkurantajn venkintojn de kolegioj de la urbo, ĉu por instruistoj aŭ gelnantoj.

Por instruistoj kiuj diplomigos pli grandan nombron da gelnantoj:

1-a loko—Ormedalo

2-a loko—Arĝentmedalo

3-a loko—bronzmedalo.

Por gelnantoj-laboro pri Esperanto:

Same—Ormedalo, arĝenta kaj bronza 3 kategorioj.

Por gelnantoj-laboro en Esperanto, prozo:

Same: 3 kategorioj.

Por gelnantoj-laboro, versaĵoj:

Same: 3 kategorioj.

★★★★★★

Laŭ la Leĝo 871 de la 23-a de aŭgusto 1976, la urbestro de Aguaf (SP), s-ro Luiz Zoldan, aprobis similan rezolucion kreinte la Premion "Lazaro Luiz Zamenhof", kiu estos aljuĝita ĉiujare al gajninto de la plej bona laboro rilatanta al la Lingvo Esperanto.

La premio estos liverita okaze de la datreveno de la urbo kaj sumos 2 minimumajn salajrojn.

La estontaj buĝetoj de la Komunumo entenos sumon por tiuj elspezoj.

La leĝo jam estis publikigita kaj registrita en la Sekretariejo de la Komunumo.

Ni kore gratulas nian vicprezidanton kaj la urbestron de Aguaf.

GRATULLETEROJ

Ni ne forgesu sendi gratulleterojn al s-ro Luiz Zoldan, urbestro de Avaí (SP), pro la Leĝo de li aprobita, kreinte la Premion "Lazaro Luiz Zamenhof".

★★★★★★

KORESPONDADO

El Pollando bela kaj 20-jaraĝa knabino petis al nia samideano Eleus L. de Sá, ke li anoncu ŝian nomon por korespondadi per bildkarto, ŝanĝo de gramofondiskoj, ktp. kun brazilan (in) oj. Jen ŝia nomo kaj adreso: Grazyna Puckackf, 64-212 SIEDLEC 207-POLLANDO.

★★★★★★

KOMUNIKOJ N°3

La Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Rua São Braz, 460-Poŝtkesto 3133 - Rio de Janeiro (RJ) - sendis al ni sian komunikilon n° 3, kies enhavo estas tre interesa pro tio, ke ĝi informas pri la valoro de jara kaj duonjara kotizoj (Cr\$ 350,00 aŭ Cr\$ 175,00) por la brazilanoj kaj US\$ 25,00 por eksterlandanoj. Al tiu, kiu varbos almenaŭ unu novan membron estas donacataj libroj laŭ propa elekto ĝis la valoro de 3 dolaroj aŭ Cr\$ 40,00. Ĝi jam havas 105 membrojn: 51 el Brazilo; 15 el Pollando; 9 el Ĉekoslovakio; po 2 el Usono, Hungarujo, Aŭstrio, Danlando, Finnlando, Francujo, Aŭstralio, Germanujo kaj Italujo; po 1 el Argentino, Kolombio, Hispanio.

nujo, Anglujo, Svedujo, Svisujo, Jugoslavio, Estonio, Bulgario, Nederlando, Grekujo kaj Portugalujo. La societo dissendis ĝis septembro 1976 la jenajn librojn: Bragavad-Gita, Homeopatio kaj Spiritismo, Sur la Vojo al la Lumo, Paŭlo kaj Stefano, La Libro de la Spiritoj, Filigranoj el Lumo, Esperanto Kiel Revelacio, Ago kaj Reago, kaj Mahatmo Gandhi. Estas dissendotaj ĝis la fino de 1976 la jenaj: Antaŭdumil Jaroj, La Turmentego de la Memmortigintoj, Mediuma Peomaro, kaj kiel Kristnaskan donacon la porinfanan: Malbona Lupo Reenkarniginta.

La komunikilo aperigas bilanceton pri la tria trimestro, montrantan la situacion de la societo.

Interesatoj volu sin turni al la societo laŭ la montrita adreso.

★★★★★★

RELIGIÃO

Nia vicprezidantino Antonieta Almada Miranda sendis al ni la jenan kunlaboraĵon: "Religião natural é a que permite ao homem chegar até Deus por meio da inteligência e da voz da consciência.

A religião sobrenatural é a que nos foi revelada diretamente por Deus, através da Bíblia.

A revelação, pela qual Deus nos deu a conhecer os seus mistérios, se fez pouco a pouco, no decorrer da História.

Esta História, que nós chamamos "História da Salvação", tem como centro a pessoa de Cristo.

Oração

Vem Senhor, à assembléia dos fiéis

que te imploram; derrama sobre eles a tua incansável bondade.

Eles te amam como seu Criador e sua Providência; renova neles os teus benefícios e guarda-os para sempre.

Por Jesus Cristo Nosso Senhor.
Amém.

★★★★★★

2-A ESPERANTIADA — Recebemos de nossa vice-presidente Elvira Fontes, presidente da Associação Paulista de Esperanto, informes interessantes sobre a segunda Esperantiada a realizar-se no dia 15 de dezembro p.f., "Dia da Língua Internacional", instituído pela Lei 505, de 18 de novembro de 1974, esperando-se que seja igual ou melhor do que a realizada em 1975. Haverá um concurso literário sob a denominação "Esperanto 76", tendo como tema "Esperanto é Solução?"

O concurso obedece ao seguinte regulamento:

- 1- Os trabalhos serão em português, datilografados em espaço duplo, com no máximo 3 páginas (tamanho ofício).
- 2- Se houver consultas a livros, revistas ou jornais, a bibliografia deve ser obrigatória.
- 3- Transcrição de trechos sem a citação da fonte anulará o trabalho.
- 4- Originalidade aumenta o número de pontos.
- 5- Esperantistas ou não poderão participar do concurso.
- 6- Não há limite de idade.
- 7- A entrega deverá ser feita na A. P. de Esperanto até o dia 22-11-76.

Prêmios: — 1º Motorádio portátil (seis faixas).

29: Bela coleção de livros sobre ou em Esperanto.

Aos autores dos 15 melhores trabalhos será ministrado um curso especial de Esperanto na sede da Associação.

LIVRARIA ESPERANTO — Bons livros V. encontrará na Galeria da Rua S. Bento, 466, Loja 3, próximo ao Metrô do Largo S. Bento. Convidamos os nossos coidealistas a procurarem seus livros na Livraria instalada para servi-los.

RIMARKO — Ni devas sciigi al ĉiuj, kiuj sendas al ni gazetojn, ke ni kun ĝojo ĉiam legas la belajn artikolojn pri Esperanto, kiujn ili aperigas. Antaŭen!

CURSO DE ESPERANTO

Estudadas as 16 regras da gramática do Esperanto, vamos tratar de exercícios e esclarecimentos dos casos menos conhecidos.

Conversação:

—Dois excursionistas se encontram e, por trazerem a estrelinha verde na lapela, cumprimentam-se:

—Bonan tagon, samideano, kiel vi fartas? El kiu lando vi estas?

—Bonan tagon! Mi fartas bone. Mi estas el Anglujo, kaj vi, el kiu lando vi estas? Laŭŝajne vi estas italo, ĉu mi erars?

—Tute ne! Vi pravas, mi estas el Milano, kie oni instruas Esperanton jam de multaj jaroj.

—Ĉu vi jam partoprenis internacian universalan kongreson de Esperanto?

—Jes, mi partoprenis plurajn kongresojn kaj esperas partopreni multajn aliajn, ĉar ili estas, laŭ mia vidpunkto la plej taŭga maniero praktikadi la uzadon de nia kara lingvo.

—Ankaŭ mi samopinias, kaj pro tio mi intencas ilin partopreni kaj ĉar mi estas novbakita esperantisto mi ankoraŭ ne partoprenis internacian kongreson.

Aqui nós interrompemos a conversação para darmos alguns esclarecimentos.

De início informamos que a expressão Bonan tagon é complemento da frase oculta "Mi deziras al vi", e por isso recebe o sinal do acusativo. Isso deve ser respeitado em todas as expressões de cumprimento. Devemos, pois, dizer: **Bonan matenon** (pela manhã), **Bonan tagon** (durante o dia), **Bonan vesperon** (à noite) e **Bonan nokton** (somente ao despedir-se para um outro dia).

UNIDADE E LÍNGUA UNIVERSAL

Nosso batalhador vice-presidente Prof. Paulo Amorim Cardoso enviou-nos um livrinho muitíssimo interessante que trata da doutrina Balaa'u'llah de autoria de John Dale, traduzido por João Christopher Pierre com sua colaboração, o qual contém grandes estímulos para o estudo do Esperanto, considerado pelo autor como a verdadeira segunda língua, destinada à união da humanidade sob o prisma da igualdade, neutralidade e fraternidade universal. Trata-se de trabalho digno de ser lido por quem difunde o Esperanto e pelos que desconhecem o seu valor como meio de comunicação. Custa apenas Cr\$ 10,00 cada, e, dez custam Cr\$ 80,00. Endereço: Caixa Postal 1221, 60.000 - Fortaleza (CE) com o Prof. Amorim Cardoso.